BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

PROPRA SIDEJO:
Ed. Jockey Club, sala 103
70.300 - Brasília - DF
Tel.: (061) 226-1298
Caixa Postal 07-1182

CGC N.º
00406 604/0001-06

1887-1987
Centjara jubileo de Esperanto

JAN–APR.1985 INFORMA BULTENO N-ro 87

## EL NIA TIRKESTO

Tiu ĉi rubriko informas nur pri tio, kio okazas interne de BKE: estrardecidoj, agado de Direktoroj k.a.; ĉio kion ni ne volas restigi en tirkesto ĉe la sidejo, sed diskonigi al ĉiuj membroj kaj al la esperantistaro.

oOo

● D-ro ROBERTO RESENDE (C. Postal 04-0222 - 70312 Brasília-DF) proponas Kampanjon por Jubilea Poŝtmarko, kion ni plene akceptas; tial ni petas ke oni sendu ĉiajn sugestojn. Ni nur atendos finan decidon de Nacia E-Komisiono pri la Centjaraj Festoj por fari la proponon al la koncerna fako de la Brazila Poŝto-Entrepreno.

● FLÁVIO FONSECA (SQS - 303 / E / 605 - 70336 Brasília-DF) - nia Direktoro pri Junularo organizis en 1984 studgrupojn, el kiuj jam esperantistiĝis 38 gejunuloj.

● Direktorino MARIALVA ALVES BORGES organizis belan festeton ĉe la sidejo en la 5ª/januaro - kune kun direktorinoj, edzinoj de estraranoj kaj aliaj sinjorinoj, kiuj regalis nin per bongustaĵoj diversaj. Tiu grupo ankaŭ preparas la tagmanĝon okazontan dimanĉe la 31an/marto, kiel fermo de la II Spiritista Esperantista Semajno.

● CENTJARO — Kiel parto de nia agado por la Centjaraj Festoj, ni konsentis kun SEI Serviço Espírita de Informações (R. Inválidos, 34 - 20231 Rio de Janeiro-RJ) — kiu funkcias kiel novaĵ-agentejo - por disdoni al la gazetaro serion de artikoloj kun plej variaj temoj (lingva, literatura, socia, politika, religia k.a.) por disvastido de E.

● LA PREZIDANTO - okaze de la enposteniĝo de la Nova Brazila Registaro - sendis oficialan gratulleteron al la simpatiantoj Ministroj: de Minoj kaj Energio - D-ro AURELIANO CHAVES, de la Armeo - Gen. LEONIDAS P. GONÇALVES, kaj ankaŭ al tiuj de Edukado kaj de Eksterlandaj Rilatoj, kies fakoj tre interesas al la Movado.



**S-ano Flávio Fonseka prezentis belegajn esperanto-kanzonjn, kiujn li mem verkis, dum la muzika parto en la inaŭguro de la propra sidejo de Esperanto-Asocio de Brasília, la 15-an de decembro 1984.**

● GRATULLETEROJN ni ricevis plurajn okaze de Kristnaskaj/Jarfinaj Festoj kaj pro la enposteniĝo de la nova estraro. Koran dankon al ĉiuj!

● LA PREZIDANTO skribis al la 2 eksprezidantoj, nun Honoraj Prezidantoj - FRANCISCO DE SOUZA ALMADA KAJ CARLOS AUGUSTO SIQUEIRA DA CUNHA - proponante ke ili daŭre kunhelpu en la ĝenerala programo, precipe koncerne nian agadon por la integriĝo de la brazila movado kaj la tutan politikon de NEK.

• DU KUNSIDOJ DE NEK okazis en januaro, unu en la sidejo de BEL kaj alia ĉe KKE, kun plej frateca altnivela etoso. Nun la 3 organizoj regule interŝanĝas ĉiajn informojn kaj malkaŝe diskutas ĉiujn problemojn, jam starigante la bazajn kondiĉojn por praktika integriĝo. Rilate la komunan agadon por la Centjaraj Festoj, oni atendas nur la kompletigon de la kadroj de la "Nova Respubliko" por elekti la koncernan Nacian Komitaton.

• FAKAJ MOVADOJ estas nia konstanta zorgo, ĉar ni konscias ke ili estas forta ilo por vigligi la tutan movadon. Ni faras kontaktojn por prioritate starigi la koncernan komisionon. Ni ne intencas (t.e. ni pensas ke ne eblas) jam nun havi diversajn fakajn komisionojn, sed nur akcelilon por naciskale interesigi la fakulojn.

• LA ASEMBLEO okazinta en la urbo Florianopolo, rajtigis la Estraron nomumi Helpantajn Direktorojn - kiuj en la sidejo plifortigu la internan strukturon kaj rapidigu la servojn - kaj Naciajn Komisiojojn kiuj kreos kondiĉojn por plej ampleksa kaj demokrata partopreno de la brazila esperantistaro en la decido pri aferoj interesantaj la Movadon. Tial kune kun la nova estraro jam ekfunkcias la jenaj:

— SIDEJO (kontrolas la aranĝon, purigadon, riparojn, aĉetadon de ĉiutagaj bezonaĵoj) - S-ino FIORINA SUEVO DE SOUZA;

— EVENTOJ (planas ĉiujn eventojn: estrarkunsidojn, asembleojn, kampanjojn, kunfratiĝajn kunvenojn) — S-ino MARIALVA ALVES BORGES;

— ADRESARO (zorgas pri la sliparoj, adressânĝoj, tiel ke la adresaro estu ĉiam ĝisdatigita - ni jam havas ĉirkaŭ 3,000 individuajn nomojn kaj, 2,000 instituciojn) - S-ino MARIA DAS DORES GOES DE OLIVEIRA;

— DOKUMENTADO (organizas la tutan arkivadon, selektas dokumentojn kiuj taŭgas por la Muzeo) — S-ro MAURO GOMES AZEVEDO;

— KOMUNIKADO (radioamatoro — PUZ AML — kiu faras kontakton kun la tuta lando kaj ankaŭ kun ekslerlando — ni jam registras stacion ĉe LABRE kaj estonte ni havos propran aparaton) — S-ro MARIO FONSECA SOBRINHO.

— JUNULARO (kompreneble, pri ĉiuj junularaj aferoj) - FLÁVIO FONSECA;

— HELPKASISTO (kontrolas aliĝojn, kotizpagojn, bankajn kontojn - la Kasisto faras la librotenistan laboron, bilancojn k. t.p.) - ADOLPHO DE MIRANDA SILVA;

— INFORMADIKO (per sia mikrokomputilo - TRS-80 color 64b. c/un.discos flexíveis S" 1/1 - preparas la tutan specifan laboron, kiun ni faros poste per nia propra aparato) - ALAN CORREA DE PAIVA.

Rilate al la Komisionoj, ni jam havas kelkajn ĝeneralajn ideojn, ekz.: Gazetara Servo, Parlamenta Agado, Fakaj Movadoj, Asista Servo, Virina Agado, Instruado k.a.; tamen, ni atendos ke la ideoj "maturiĝu" kaj precipe ni pripensas da nomojn por ilia konsistigo.

• AMARÍLIO CARVALHO - Komisiito de BKE por Landa Disvastigado - jam sin anoncis por fari prelegvojaĝon al Akreo (AC); li povos fari kursojn kaj ĝeneralan helpon al esp-istoj por organizi lokan movadon.

• LEGIÃO DA BOA VONTADE (Av. Rudge, 700 - Bom Retiro - 01134 S. Paulo-SP), kiu disdonas senpage mesaĝojn en E., intervjuis nian Prezidanton. Tiu intervjuo aperos sur ĝia gazeto kaj estos prezentata dum radioprogramo.

• LA PREZIDANTO perletere kontaktas kaj persone vizitis urbojn en la tiel nomata Triângulo Mineiro, kie la movado notinde kreskas. Tie li faris prelegojn kaj csehmetodajn demonstraciojn.

• DECIDO DE NEK - BKE estas komisiita kiel Konstanta Kongresa Komitato. Nia Prezidanto dum vizito al B.H. kontaktis la estraranojn de Sociedade Mineira, Instituto E. de Educação kaj la nova Associação Esp-ista de BH, kiu respondecas pri la starigo de la Loka Kongresa Komitato kaj sekve la okazigo de la 21ª. Nun estas ĉio en ordo; ek al la laboro!

• La Prezidanto kaj la Kasisto reekzamenas nian ĉi-jaran buĝeton, kiun kredeble ni devos ŝanĝi antaŭvidante i.a. la eventualan aĉeton de radioamatora aparato kaj mikrokomputilo.


## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**Honoraj Prezidantoj**

**Francisco de Souza Almada (Av. Bern. de Campos, 624 Ap. 72, BR 11100 - Santos-SP)**
**Carlos A. S. da Cunha (Alameda dos Maruás 471, BR 04068 - S. Paulo-SP)**

**Estraro (1985/87)**

**Prezidanto - Nelson Pereira de Souza**
**Tel.: 242-5211 (061)**
**Vicprezidanto - Elvira Fontes (Caixa Postal 5.888, CEP 01000 - S. Paulo-SP)**
**Sekretario - Ludimar Azevedo da Silva**
**Tel.: 562-8904 (061)**
**Kasisto - José Carlos Dorini Ramos**
**Tel.: 577-2214 (061)**
**Kulturaj Aferoj - Dro Paulo Vieira da Silva**
**Tel.: 553-1365 (061)**

**Informa Bulteno**

**Ricevas ĝin senpage la Membroj kaj ĉiu, kiu faras donacon almenaŭ unufoje en la jaro.**

**Ĉefredaktoro**
**Nelson P. de Souza**

**Kunlaboraĵoj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.**



## BRAZILAJ NOVAĴOJ

**AKREO (AC)**

- UASIL - Dum la tuta Sankta Semajno okazos la Unua Akrea Seminario pri Internacia Lingvo kiun organizas s-ano JORGE LUIZ C. DO AMARAL (C. Postal 454 - 69900 Rio Branco-AC).

**BAHIO (BA)**

- Prof. ELÉUS L. SÁ, senlaca laboranto en la urbo Ilhéus, sukcesis pliajn venkojn, nome: 1) enkondukis E-librojn en la Urban Bibliotekon; 2) fariĝis Direktoro de la Urba Historia Instituto. Indas gratuli la 2 instituciojn, skribante al: 1) SECRETARIA MUNICIPAL DE EDUCAÇÃO (Praça Misael Tavares s/n. - Cidade Nova - 45660); 2) INSTITUTO HISTÓRICO DE ILHÉUS (Edifício da Associação Comercial. La poŝtkodo por ambaŭ estas: 45660 Ilhéus (BA).
- BAHIA SPIRITISTA ESPERANTISTA JUNULARO - BSEJ (Praça Anchieta, 8 - Terreiro - 40000 Salvador-BA) daŭre aktivas sur la kampoj EEE kun granda entuziasmo. Ĝi jam sendis spiritismajn E-librojn al 44 landoj.
- S-ro RUDOLF STADELE, germana esp-isto, vizitis la E-organizojn en Salvador, kaj montriĝis vere entuziasma pri la koka movado.
- OTAVIANO CURVELO DE SOUZA (C. Postal 87 - 45600 Itabuna-BA) vigle laboras por enkonduki E-on en la evangeliajn mediojn, kaj petas ke oni kontaktu lin tiucele.
- SOCIEDADE ESPERANTO DE SALVADOR (C. Postal 2550 - 40000 Salvador-BA) post la I Renkontiĝo, en la urbo Cruz das Almas, ekpaŝis al pli vigla agado per kursoj, prelegoj ktp.

**BRAZILJO (DF)**

- E-ASOCIO DE BRASÍLIA (Ed. Rádio Center s/2142 - 70084 Brasília-DF) okazigis - de la 4ª ĝis la 9ª/februaro - 2 kursojn samtempe por E-instruistoj. Ilin gvidis Prof. GERALDO MATTOS, kaj partoprenis 50 homoj el 7 ŝtatoj. Kiu interesiĝas por eventuala uzo, skribu petante detalojn.
- II SPIRITISTA ESPERANTISTA SEMAJNO - de la 24ª ĝis la 30ª/marto - sub la aŭspicioj de FEDERAÇÃO ESPÍRITA DO DISTRITO FEDERAL (SQS - 408/AE - 70257 Brasília-DF). En ĉiu tago dum la tuta semajno en malsamaj centroj okazos prelego pri E., kaj en la sekva dimanĉo (la 31ª) estos kunfratiĝa tagmanĝo.
- Prof. JOSIAS FERREIRA BARBOSA (Q. 30, L. 7 - S. Oeste Gama - 72400 Brasília-DF) klopodas por starigi E-Rondon en tiu satelita urbo de Braziljo. Ni helpu lin!
- E-GRUPO ĈE FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA (Q. 603/Norte - 70830 Brasília-DF) okazigis tre belan kursfinan festeton kun varia kaj tre interesa artprogramo, inkluzive de teatraĵeto "Tonito la Elefanto".

**MARANJO (MA)**

- HERASMO LEITE (C. Postal 13 - 65200 Pinheiro-MA) iam loĝinta en Braziljo, kie li lernis E-on, revenis al la naskiĝurbo. Tie li jam aktivas, kaj volas kontaktojn por ĝisdatigi la novaĵojn.

**MINASĜERAJSO (MG)**

- E-DEPARTEMENTO ĈE UEM (R. Guarani, 315 - 30000 Belo Horizonte-MG) publikigas en sia informilo interesajn raportojn, ekzemple pri la 21ª Brazila Kongreso kaj pri la IV JARE (Jara Renkontiĝo de Esperantistoj en Belo Horizonte).
- ACESITA E-KLUBO (C. Postal 191 - 35180 Acesita-MG) per sia Bulteno montras la aktivan agadon de s-ano D-ro Adonis Saliba kaj liaj kunlaborantoj.
- CLUBE DE E. DE MONTES CLAROS (C. Postal 463 - 39400 Montes Claros-MG), plensukcese aktivas. La 9an de marto komenciĝos nova baza kurso.
- E-KURSO JOHANO ERNESTO kaj SPIRITISTA JUNULARO "VERO KAJ LUMO" (Rua Santo Antonio s/nº - C. Postal 187 - 36500 Ubá-MG) dank' al vigla agado de Inĝ. WÂNER MARLIÈRE ARRUDA aktivas en la naskiĝurbo de I.G. Braga.
- TRIÂNGULO MINEIRO, bela kaj riĉa regiono de ŝtato Minasĝerajso. La movado rimarkinde reviglIĝas en la urboj Uberaba, Uberlândia kaj Araguari, kun influo eĉ en najbaraj urboj de ŝtato San-Paŭlo, kiel Igarapava k.a.
- ASSOCIAÇÃO ESP-ISTA DE B.H. (R. Carijós, 141 s/807-8 - 30000 b. Horizonte-MG), ĵus fondita, havas jenan Estraron: Prez. - Carlos Augusto Guedes; Vic. - Marcus Túlio Flores; Fin. - Dalmo S. Arantes; Instr. - Said P. Albuquerque; Socia - Ana Lucia S. Crespo.
- MOACIR MELO (C. Postal 13 - 39100 Diamantina-MG) antaŭlonge lerninta E-on ĉe YMCA en Rio, intencas komenci kurson kaj petas kunlaboron.
- PATOS E-SOCIETO (C. Postal 133 - 38700 Patos de Minas-MG) havas novan Estraron: Prez. - Waldemar A. Mendes; Vic. - John E. F. Luiz; 1ª Sekr. - Arnaldo L. Ferreira; 2ª Sekr.: Eber A. Rocha; 1ª Kas. - Marcio J. Pereira; 2ª Kas. - Edvar J. Silva; Oratoroj: Ricardo F. Santos kaj José R. Silva.

**PARAIBO (PB)**

• Prof. FRANCISCO H. B. LAVOR (C. Postal 375 - 58000 João Pessoa-PB) aktive propagandas kaj instruas. Ĉiu povas lin helpi sendante materialon.

**RIO–DE–ĴANEJRO (RJ)**

• Prof. SYLVIO MALHEIROS efike laboradas en la urbo Rio, instruante ĉe UERJ (universitato) kaj Milita Kolegio, kaj daŭre kunlaboras kun BKE ofte sendante opiniojn kaj sugestojn.

• NITEROI E–KLUBO (C. Postal 10 - 24000 Niteroi-RJ) ĉiujare akurate diskonigas siajn bilancon kaj raporton. Imitinda modelo!

• CENTRO ESPÍRITA DE VALENÇA (Praça 15 de Novembro, 632 - 27600 Valença-RJ) okazigis tre interesan E-Dimanĉon kun ekspozicio, aŭkcio, tagmanĝo, radioprogramo kaj prelego de Prof. Celso Martins el Rio.

• VOLTA REDONDA E-KLUBO (Rua 1 nº 745 - M. Granja - 27180 Volta Redonda-RJ) en la 18ª/marto komencos novan kurson gvidatan de D-ro Alberto Flores ĉe Escola de Engenharia Metalúrgica. Krom la loka klubo aŭspicias la kurson: Diretório 17 de Julho, Sindicato dos Engenheiros kaj Conselho Municipal de Cultura.

• FUNDAÇÃO ESPÍRITA "BEZERRA DE MENEZES" (Rua da Constituição, 45 sob. - 20060 R. Janeiro-RJ) petas ĉies helpon por la infanedukejo LAR DA CARIDADE. Ĉu oni kaptu la okazon por provi la enkondukon de E. tie?

• BOLETIM DO GRUPO ESPIRITA "FRANCISCO DE ASSIS" (R. Djalma Dutra, 28 - 24000 Niterói-RJ) publikigis interesan artikolon de D-ro Joaquim do Couto, Prezidanto de Niterói E-Klubo.

• Prof. JOZEFO JOELS. Post longa serĉado ni fine retrovis tiun pioniron, kiu dum pluraj jaroj instruis al la pli malnovaj esp-istoj, verkis la unuan vortaron en Brazilo kaj tradukis i.a. la konatan verkon de Ruy Barbosa. Li estas jam tre maljuna; preskaŭ blinda, kaj eĉ ne povas eliri; oni devas ĉiel omaĝi lin, skribi aŭ viziti lin: Rua Barata Ribeiro, 184 apto. 402 - 22011 Rio de Janeiro-RJ.

**SAN-PAŬLO (SP)**

• COORDENADORIA DE CULTURA E TURISMO (Rua Mal. Deodoro da Fonseca, 324 - 13200 Jundiaí-SP) okazigis novan disdonadon de diplomoj al kursfinintoj, en la 31ª/Januaro.

• NOVA ERA E–GRUPO (R. Martin Afonso, 78 casa 6 - Belém - 03057 S. Paulo-SP), ĵus fondita, jam disdonis diplomon al 22 kursfinintoj. La Estraro estas: Direktoro - José Machado; Vic. - Nelly Furtado; 1ª Sekr. - Wilson R. Santos; 2ª Sekr. - Margarida G. Machado; Kas. - Luiz J. Andrade; 1ª Bibl. - Dalva Portella; 2ª Bibl. - Vera D. Toledo.

• SOROCABA E–KLUBO (C. Postal 234 - 18100 Sorocaba-SP) organizis kadre de la Semajno de Amikeco la IIIan Regionan Renkontiĝon, en la urbo São Roque, la 24an de februato. Gratulon!

• S-ro MANOEL MOACIR SISCATI dum longaj jaroj bataladas por nia ideo, kaj nun li havas tre entuziasman sekvanton: LUIZ CARLOS DO NASCIMENTO (R. Luiz Barreto, 468 - Campos Elíseos - 14100 Ribeirão Preto-SP). Oni sendu ĉian materialon al li.

• CANTINHO DA AMIZADE (C. Postal 113 - 16500 Cafelândia-SP) havas vastan programon kaj ankaŭ interesiĝas pri Esperanto. Kiu helpos?

• STUD–GRUPO fondiĝis ĉe Centro Espírita Luz, Caridade e Amor (C. Postal 11 - 14540 Igarapava-SP) kaj bezonas ĉies kunhelpon.

• BRAZILA ESPERANTISTA KATOLIKA ORGANIZO (C. Postal 4421 - 01000 São Paulo-SP) regule eldonas la tre gravan BRAZILA KATOLIKO kaj meritas ĉies apogon, kompreneble precipe de la katolikoj esperantistoj.

**SUDA RIOGRANDO (RS)**

• ASSOCIAÇÃO GAÚCHA DE ESPERANTO (R. Andradas, 1137 cj. 1704 - 90000 p. Alegre-RS) ĝis 1986 havas jenan Estraron: Hon. Prez. - D-ro Modesto Belmonte de Abreu; Prez. - D-ro Ivo Sanguinetti; Vic. - G. O. Vaske; Sekr. - Zelia C. Silva; Fin. - Solon F. Sant'Anna; Kult. - Cesar D. Soares.

## BRAZILA KONGRESO

Laŭ sciigo de la Loka Organiza Komitato, oni ĵus dissendis cirkuleron kaj aliĝilojn. La kotizo estas: Cr$ 15.000 ĝis la 15ª/aprilo, Cr$ 20.000 ĝis la 30ª/junio kaj poste Cr$ 30.000 ĝis la inaŭguro. Baldaŭ LOK diskonigos ĉiujn ceteraj informojn.

## KION DA? KIE?

Ruy Cavalcanti Albuquerque (Banco do Brasil – CACEX/DICEX – Av. Rio Branco, 65/1112 – 20090 Rio de Janeiro-RJ) faras tre interesan laboron – pri kiu ni jam raportis: listigas la esp-istojn, kiuj estas liaj kolegoj funkciuloj de B.B. Li jam trovis ĉirkaŭ 300, sed oni scias ke estas multaj aliaj en la tuta lando; tial do ni petas ke ili sin anoncu – aŭ ĉiu informu pri tiuj, kiujn li konas.

# BRAZILJO, BRAZILJO!

Nelson Pereira de Souza

Kiu ĉeestis la inaŭguron de la propra sidejo de Esperanto-Asocio de Brasília kaj rigardas la ĉefurban poresperantan agadon el la lastaj jaroj, tiu facile povas konstati - krom la tute speciala fakto, ke Braziljo estas la sola urbo en la suda hemisfero, kie okazis Universala Kongreso – ke ĉi tie ekzistas jam ĉiuj ingrediencoj de vigl a Movado.


Inaŭguriĝis la urbo en la 21ª de aprilo 1960, kaj jam la 3an de novembro aperis en la periodaĵo "Correio Braziliense" interesa intervjuo kun kelkaj esperantistoj ĵus transloĝiĝintaj precipe el Rio de Ĵanejro. En 1961 okazis la unuaj bazaj kursoj, kaj la 21an de aprilo 1962 (nur 2 jarojn post la inaŭguro) fondiĝis EAB kun la helpo de esperantistoj venintaj el aliaj urboj kaj ankaŭ de novaj lernintoj.

Vere la unua pioniro estis s-ro Sebastião Carneiro de Campos (Secarcam), kiu propagandis jam de antaŭ 1960; sed bedaŭrinde ne restis informoj pri lia agado. Mi mem renkontis lin nur 2-3 foje en 1960/1, kaj li malaperis. Mi aŭdis ke li poste mortis.

En 1974 fondiĝis BKE, kiu tuj aĉetis ĉambron en la urbo-centro. En 1976 okazis ĉi tie Seminario de la Kooperativo; tiam oni kuraĝis lanĉi la ideon pri la UK, kiu fine okazis en 1981. La invitanta asocio estis EAB, kaj la LKK funkciis en la sidejo de BKE.

Lastjare la ĉefisidejo de FEB (Federação Espírita Brasileira) – kiu havas gravan rolon en la brazila movado – translokiĝis en Braziljon, kaj FEDF (la loka Federacio) iniciatis la Spiritistajn Esperantistajn Seminariojn. Depost tiuj paŝoj – ankaŭ kun la grava helpo de SEI (Serviço Espiríta de Informação) - la tuta reto de miloj da spiritismaj centroj, inkluzive de ties gazetaro, faras regule pli vastan disvastigadon de Esperanto.

Interesa fakto okazis ĉirkaŭ 1979: en la kursoj, kiujn mi gvidis ĉe la privata universitato CEUB enskribiĝis la unuaj gelernantoj *naskiĝintaj en Braziljo* ... kaj iom post iom la braziljanoj fariĝas la plimulto. Tiu estas eble unu al la motivoj, kial da movado montriĝas rimarkinde forta; sed la ĉefa certe estas: Braziljo jam aperas en la statistikoj kun granda nombro da batalantoj kaj simpatiantoj, sekve kun preskaŭ ĉiuj tendencoj kaj interesoj de la esperantista mondo: homoj instruas, tradukas, verkas, prelegas, kantas, muzikas aŭ rolas en teatraĵoj, kaj eĉ okazas agado en diversaj fakaj movadoj.



**Akademiano Prof-ro D-ro Geraldo Mattos antaŭ siaj gelernantoj, en Esperanto-Asocio de Brasília. Fotis: R. Resende.**

## ADRESOJ EN BRAZILJO

**Ĉar ofte okazas mistrafo de korespondaĵoj, ni informas la korektan adreson de E-organizoj en la ĉefurbo:**

– BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
C. Postal 07-1182 - poŝtkodo 70000
Ed. Jockey Club s/103
SCS - poŝtkodo 70300

– ESPERANTO–ASOCIO DE BRASÍLIA
C. Postal 11-1124 - 70000
Ed. Radio Center s/2142 - 70710

– LABORGRUPO ANTAŬEN
C. Postal 07-1055 - 70000
HIGS-705 / O / 29 - 70350



## TRA LA MONDO

• BOLETIN de Hispana Federacio (Apartado 119 – 47080 Valladolid – HISPANIO) ĉiam enhavas utilajn informojn kaj interesajn artikolojn. Koran dankon pro la regula sendado!

• INFORMILO de Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato (15, rue Victor Duruy – F 75015 Paris – FRANCIO) vigle batalas kontraŭ ĉiuj malbonaĵoj en la homa vivo, precipe la malsato. Grava internacia forumo!

• NILS ALVAR EKSTEN – Poŝtkesto 4050 – S-261 04 Landskrona – SVEDIO) aktivigas SEL – agadojn (SEL signifas SKOLTA ESPERANTO-LIGO) Kaj petas ĉies helpon koncerne informojn pri geskoltaj kaj esperanto-agadoj.

• ESPERANTIX – 11 rue Frédéric Magisson – 75015 Paris – FRANCIO) eldonisto de TINĈJO kaj LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ anoncas ke ĉi-lasta gajnis la unuan premion kiel infanlibro kaj estis uzita en kursoj kun granda sukceso.

• RÁDIO POLÔNIA (00–950 Varsovio – P.O. Box 46 – POLLANDO) disaŭdigas ĉiuetage de pli ol 25 jaroj kun novaĵoj, komentarioj kaj internaciaj temoj.

• H. BAKKER (Kastelenstraat 231 – 1082 EG Amsterdam – NEDERLANDO) daŭrigas plu la tre noblan kampanjon "Ĝemeloj kun Afriko". En Brazilo jam kunhelpas StudGrupo Zamenhof (Salvadoro) kaj Laborgrupo Antaŭen (Braziljo); kiuj aliaj pretas partopreni? Skribu rekte al li! BKE–Estraro tre ŝatus krei Komisionon tiurilate.

• S–ro H. R. SCHMIDT – ILEF Estrarano (str. d. Freundschaft 23 – DDR 5400 Sondershausen – Orienta Germanio) kompilas kvarlingvan (germanan, francan, anglan, Esperantan) vortoliston pri foto-kino-optiko, kaj serĉas kunlaborantojn-fakulojn.

• INFORMILO de Internacia E–Muzeo (Batthyanustiege 3 – Hofburg – A 1010 Wien – AŬSTRIO) apenas kvaronjare kun tre diversaj kaj aktualaj sciigoj, precipe pri novaj eldonaĵoj. Jarabono: 8 irk.

• DISKRIMINACIO estas kolekto de i.a. 23 prelegoj kaj komentarioj pri la kongresa temo de la 65ª UK, aranĝitaj de d-ro Renato Corsetti kaj eldonitaj de UEA. Mendebla ĉe Librosero de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

• LA MIGRANTO aperigis tre gravan artikolon de Prof. Konrad Lorenz, Nobelpremiito: "La krea verko renversite. Ĝia pereo. "Ĝi estas parodio pri la septaga kreo de la mondo... nun la septaga detruo. Petu provekzempleron (N-ro 100) sendante e irk al TANEF – Postfach 225 – CH 4003 – Basel – SVISIO). Ankaŭ oni povas peti portugallingvan tradukon al Prof. Eleus L. Sá – C. Postal 72 – 45660 Ilhéus-BA.

• KOOPERATIVA E–SEKCIO de Bulgara E–Asocio (Bul. Hr. Botev 97 – 1303 Sofio – GULGARIO) raportante pri la 2ª Kooperativa Konferenco okazinta en Budapesto, strebas pri internacia kooperativa organizo.

• INTERNACIA E–INSTITUTO (Riouwstraat 171 – 2585 HW Hago – NEDERLANDO) kun aliaj E–organizoj okazigis Seminarion pri Moderna Cseh-Metodo, ĉe Kultura Centro Esperantista (Pf. 771 – CH 2301 – La Chaux-de-Fonds – SVISIO).

• MONDA EL–KANTO POR PACO agnoskas: "Homoj tutmonde unuiĝantaj en kanto povus efektivigi moralan kaj politikan premon al la registaroj por kunligiĝi kaj kunlabori." Informoj ĉe: RUTH C. JOHNSON – 4360 N. 133 St. – Brookfield, WI – 53005 USONO.

• ILERA BULTENO informas pri ĉio koncernanta la radioamatoran medion. En Brazilo respondecas: ENIVALDO ALVES SILVA – PT 2 CA (C. Postal 04-0144 – 70312 Brasília-DF).

• MIKRO-KOMPUTILO (Komputista Grupo de HEA – Pf. 193 – H-1368 – HUNGARIO) estas la faka revuo pri komputado kun artikolaro kolektita prefere pri mikroelektroniko, mikrokomputiloj. Verŝajne ankoraŭ ne estas reprezentanto-kunlaboranto en Brazilo.

• LA ESPERO (C.P.O. Kesto 4258 – Seulo 100 – KOREIO) ĉiam enhavas bonan legaĵon kaj precipe informojn pri la landa movado.

• O V O – Internacia Gazeto por Distro Kaj Amuzo (Kroatia E–Ligo – Amruŝeva 5/1 – 41000 Zagreb – Jugoslavio). Jarabono 35 gld. aŭ egalvaloro. Ni tute konsentas pri la enkonduko de la unua numero; ke jam de longe sentiĝas la manko de TIA revuo. Antaŭ multaj jaroj estis simila provo pere de La Praktiko, eldonita de la Cseh-Instituto, sed ĝi malaperis... Kredeble ankoraŭ ne estas reprezentanto em Brazilo; kiu deziras labori tiucele?

## AGADPROGRAMO DE LA NOVA ESTRARO DE BKE

I) Plioftigi la kontaktojn kun la 2 aliaj naciaj organizoj cele al la definitiva strukturigo de NEK kaj ties plena funkciado.

II) En la kadro de NEK – konsente kun la 2 cititaj – fari la necesajn paŝojn por la festoj de de Centjaro laŭ "Kiu faru kion".

III) Klopodadi por plifortigi la institucíojn, kiuj estas asociaj membroj (kategorioj A kaj B) per pli efika kunlaborado kun ili. Same ankaŭ koncerne ĉiujn lokajn grupojn.

IV) Krei kondiĉojn por kiel eble plej aktiva kunlaboro de la individuaj membroj (kategorio C) por starigo i.a. de Komisionoj, Kadro de Helpantoj, kaj pligrandigo de la Kadro de Delegitoj – tiucele ni kreu Regularo (j)n. Strebi por allogi la unuopajn esperantistojn, ke ili partoprenu aktive la Movadon.

V) Plani kaj lanĉi kampanjon por GRUPA LERNADO, kun ĉefa celo faciligi la disvastigadon de la lingvo dum la antaŭ centjara periodo, precipe en la hejmoj, en urbetoj, kaj andkaŭ ĉe kulturaj aŭ religiaj institucioj, kie ne eblas organizi kurson.

*(Prezentita ĉe la assembleo okazinta em Florianópolis (SC), la 18an de novembro 1984).*

• BULGARINO – Jara Eldono de la Komitato de Bulgaraj Virinoj. Kia belaĵo! Kaj oni petas: "Skribu al Ni.": bul. P. Evtimij 82 – Sofia – BULGARIO.

• INTERNACIA ĴURNALISTO (kv. Borovo, bl. 219, vh. B – 1680 Sofio – BULGARIO) prezentas interesan materialon fakan kaj ĝeneralan. Ĝi estas oficiala organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio-TEĴA, kies Membro-A estas profesiaj ĵurnalistoj, kaj Membro-B ĉiuj, kiuj nur regule kunlaboras kun amaskomunikiloj. Ĉu estas membroj en Brazilo?

## NIA FAMILIO "KRESKEGAS"



Ni bonvenigas niajn novajn membrojn:

KATEGORIO "A"
Amazona Esperanto-Asocio
Ipatinga Esperanto-Frateca Grupo

KATEGORIO "C"
Ruy C. Albuquerque - RJ
Evandro S. Martins - MG
Sebastião R. Marcelino - MG
Antonio José Costa - DF
Thereza Sita de Cars - RJ
Elizane Bueno Mendes - DF
Nívea G. Nasser - DF
Ruth Pinheiro de Souza - DF
Maria Irma P. Oliveira - DF
Helena de Souza Vianna - DF
Clélia Celita C. Pessanha - DF
Amaide Lima e Silva - DF
Domervil José Teixeira - GO
José Antonio Schiavinati - SP
Jacks Teonas Gonçalves - DF
Flávio de Souza Pereira - RJ
Nelzito Santos - BA
Cristovam C. Milagres - MG
Evaristo Manoel Pereira - SP
Alipio Cardoso de Lima - DF
Herasmo Leite Soares - MA
Lazaro O. Camponês do Brasil - SP
Sebastião Almeida Oliveira - MG
João Paulo do Nascimento - SP
Ronaldo Ferreira Junqueira - MG
Waldemiro Corrêa de Faria - DF
Moarê de Miranda e Silva - DF
Marialva Alves Borges - DF
Flávio Fonseca - DF



## MONDONACOJ ESTAS BONVENAJ!

Sylvio Malheiros - RJ . . . . . . . . . . 10.000
Maria Cristina Ferreira - MG . . . . . . . 4.000
Elmir Ribeiro Dias - MG . . . . . . . . . 4.000
Cristiano R. C. Oliveira - MG . . . . . . 4.000
Rinaldo Henrique Rios - MG. . . . . . . . 4.000
Luiz Carlos de Oliveira - MG. . . . . . . 4.000
Marcus Machado - MG . . . . . . . . . . 4.000
Suely B. Carvalho - MG. . . . . . . . . . 4.000
Nídia Fonseca e Silva - MG . . . . . . . 4.000
Marilene V. de Melo - MG . . . . . . . . 4.000
Rômulo V. de Souza - MG. . . . . . . . . 4.000
Isarci José da Silva - MG . . . . . . . . 4.000
Hélio Andreson Duarte - MG . . . . . . . 4.000
Paulo R. Santos - MG. . . . . . . . . . . 4.000
Jorge das Neves - RJ . . . . . . . . . . 10.000
Helmuth Schenk - SP. . . . . . . . . . . 4.000
Ary Zamora - RS . . . . . . . . . . . . 10.000
Maria Julia J. R. Cunha - MG . . . . . . 5.000
Ronaldo F. Junqueira - MG . . . . . . . 5.000
Godofredo de Araujo Goes - BA . . . . 20.000
Lauro de Abreu Coutinho - RJ . . . . . 10.000
Álvaro Rabelo - PR . . . . . . . . . . . 5.000
Gilberto A. Silva Velho - SP . . . . . . 10.000
Elvira Fontes - SP . . . . . . . . . . . 15.000
José Passini - MG . . . . . . . . . . . 10.000
Antonio Bezerra de Oliveira - DF . . . . 5.000
Helio Fontoura Aderne - MG . . . . . . . 5.000
José de Paiva Carvalho - MG. . . . . . . 10.000
Thereza Sita de Cars - RJ. . . . . . . . 10.000
Antonieta Almada Miranda - SP. . . . . 10.000
Paulo Vieira da Silva - DF . . . . . . . . 5.000
Arnon R. Vasconcelos - PE . . . . . . . . 2.000

## BRAZILAJ RADIOAMATORAJ ELSENDOJ

<table>
<tr><th colspan="2">HORO</th><th rowspan="2">LINGVO</th><th rowspan="2">FREKVENCO - MHz</th><th colspan="7">RONDO – TITOLOJ</th></tr>
<tr><th>GMT/UTC</th><th>BRAZILJO</th><th>Lun.</th><th>Mar.</th><th>Mer.</th><th>Ĵaŭ.</th><th>Ven.</th><th>Sab.</th><th>Dim</th></tr>
<tr><td>0830–1000</td><td>0580–0700</td><td>Port.</td><td>7,164</td><td colspan="7">MATENA KAFETO</td></tr>
<tr><td>0900–1000</td><td>0600–0700</td><td>Port.</td><td>7,10</td><td colspan="7">SURVOJE AL INTERNLANDO</td></tr>
<tr><td>0900–1000</td><td>0600–0700</td><td>Esp.</td><td>7,18</td><td colspan="7">BREK – Brazila Radioamatora E–Klubo</td></tr>
<tr><td>0940–1030</td><td>0640–0730</td><td>Port.</td><td>3,65</td><td colspan="7">Piĵamo–Rondo</td></tr>
<tr><td>1100–1200<br>1300–1400<br>1900–2000</td><td>0800–0900<br>1000–1100<br>1600–1700</td><td>Port.</td><td>7,145<br>14,290<br>14,290</td><td colspan="7">FEEU Fraternidade Eclética Espiritualista UNIVERSAL</td></tr>
<tr><td>1530–1700</td><td>1230–1400</td><td>Port.</td><td>14,16</td><td colspan="7">UNUIĜINTA BRAZILO</td></tr>
<tr><td>2030–2130</td><td>1730–1830</td><td>Esp.</td><td>14,266</td><td colspan="7">VERDA RONDO</td></tr>
<tr><td>2300–2400</td><td>2000–2100</td><td>Port.</td><td>3,730</td><td colspan="2">BADEN POWELL</td><td></td><td></td><td colspan="3">BADEN POWELL</td></tr>
<tr><td>2330–0100</td><td>2030–2200</td><td>Port.</td><td>3,74</td><td colspan="7">LANDELL DE MOURA</td></tr>
<tr><td>2330</td><td>2030</td><td>Port.</td><td>7,07</td><td></td><td>QTC LABRE</td><td></td><td></td><td></td><td></td><td></td></tr>
<tr><td>2330</td><td>2030</td><td>Port.</td><td>14,17</td><td></td><td></td><td>QTC LABRE</td><td></td><td></td><td></td><td></td></tr>
<tr><td>0030</td><td>2030</td><td>Port.</td><td>3,70</td><td></td><td></td><td>QTC LABRE</td><td></td><td></td><td></td><td></td></tr>
</table>

Ĉi tiun tabelon organizis nia Direktoro pri Komunikoj, S-ro Mário Fonseca Sobrinho – PU 2 AML. Bonvolu kunlabori per korektoj, aldonoj, k.a; donu opiniojn kaj sugestojn.